


Bulgara

ESPERANTISTO





Fotoj: Post la jarkunveno de „Mondamikeco“ — Ĉirpan
(vd. p. 9)



El la jarkunveno de „Trakia Lumo“ — Marica. Parolas
la reprezentanto de DK en Ĥaskovo [k-do Nikola Pilev
(vd. p. 9)



ENHAVO

* * *	Por plus florado de la demokratio en nia lando	1
Nikolaj Zidarov.	Al la partio. Tradukis Simeon M. Simeonov	3
Cano T. Ignev.	Esperanto en la maili- berejo de Sliven	3
* * *	Изменения на устава на БЕС	7
* * *	Niaj jarkunvenoj	8
* * *	Novaj Esperanto-kursoj	9
P. Petrov.	Vintra promenado — ankaŭ bona E-aktiveco	10
K. I.	Vespero pri Stefan Kiraĝiev	10
Anton Antonov.	En Kubrat — VARE-76	10
Jordan Tanev.	Siberio — ĉefa objekto de la Dekaj Kvinjara Plano	11
N. Aleksiev.	Jubileo de amiko de bulga- raj esperantistoj	11
Dimitro Denĉev.	Amiko de Bulgario	12
O. Knichal.	Pri Esperanto en sindikata konferenco	13
Jakov Vlasov.	„Neforgeseblaj tagoj“	13
N. Aleksieva.	El „Ne tiel... sed tiel ĉi“ de F. Faulhaber	14
Fl. Nikolov.	Matematika enigmo	14
Kiril Kuraškeviĉ.	Balado pri la senmor- teco. Tradukis Evĝeni Vasilev	15
Marin Băcev.	La unuaj	15
	Deziras korespondi	III

Sur la kovrilpaĝo:

Partoprenantoj en la Vintra Amika Renkon-
tiĝo Esperantista en Kubrat — VARE (vd.
paĝon 10)

Partoprenantoj en la unusemajnaj E-kursoj
en Asenovgrad dum la novjara ferio de la
instruistoj kun siaj instruantoj K. Vălev, V.
Oljanov, J. Markov kaj la administra organi-
zanto Z. Ivanov

**POR PLUA FLORADO DE LA DEMOKRATIO EN NIA LANDO**

Socialismo kaj demokratio estas nedisigeble ligitaj. La ĉiuflanka plivas-tiĝo kaj plifortiĝo de la demokratio, la maksimuma aktiviĝo de la popol-amasoj kaj ties partopreno en la regado de la ŝtato estas premiso por la kreo de la socialisma socio. La perfektigado de la demokratio estas unu el la plej gravaj faktoroj por sukcesa progreso en ĉiuj sferoj de la vivo.

La socialisma demokratio havas sian enhavon. Tio ĉi estas antaŭ ĉio la liberiĝo el la katenoj de la kapitalo kaj el la ekspluatado de la homo fare de homo. Tio ĉi estas la libero de la homoj ne esti ĵetataj en ekster-majn militojn en la intereso de la imperiismo. Tio ĉi estas libero je socia kaj nacia premo kaj je rasa diskrimino. Tio ĉi estas la firme garantiitaj fundamentaj homaj rajtoj, kiel la rajto de laboro kaj studado, la socia asekuro, la sen-paga medicina helpo kaj ripozo. Tio ĉi estas egalrajteco de la viro kaj la virino en ĉiuj sferoj de la vivo. La socialisma demokratio postulas altan politikan aktivecon, altnivelan instruitecon kaj kulturon de la popolamasoj. Tio ebligas al la laboruloj partopreni ĉiam pli kompetente, efektive kaj res-pondece en la regado de ĉiuj sferoj de la socia vivo. Ĝi signifas liberon de parolo, de kunvenoj kaj de publikigoj, kiujn la civitanoj de nia lando ĝuas plej larĝe.

La socialisma demokratio estas harmonia sistemo de ŝtataj kaj sociaj organizaĵoj, kunordigataj kaj direktataj politike de la ĝenerale rekonita politika avangardo de la socio — la komunista partio, kiu, komence partio de la laborista klaso, nun jam esprimas la vivinteresojn de ĉiuj laboruloj en nia lando kaj garantias utiligon de la mekanismo de la popola ŝtato por la bono de la homo.

La socialisma demokratio tamen ne estas io donita por ĉiam. Ĝi dis-volviĝas konstante. Gravan signifon por tio havas la sociaj organizaĵoj. En la etapo de konstruado de matura socialisma socio, en kiu nun troviĝas Popola Respubliko Bulgario, iliaj rolo kaj signifo kreskas ĉiam pli kaj pli. Tio ĉi estas objektiva neceso kaj unu el la ĉefaj direktoj en la disvolviĝo de la socialisma demokratio. Elirante el tiu ĉi koncepto, la Tezaro de CK de la Bulgara Komunista Partio pri la ŝtato kaj la disvolviĝo de BKP kaj de la sociaj organizaĵoj kaj movadoj, publikita la 5-an de februaro 1976, sub-strekas la neceson pri plua plialtigo kaj plifortigo de la rolo de la sociaj organizaĵoj kaj movadoj en la konstruado de matura socialismo.

La Tezaro emfazas la postulon esti kreitaj kondiĉoj por disvolviĝo de la specifeco de tiuj ĉi organizaĵoj, por konstanta pliboniĝo de ilia laboro kaj por ĝia pliriĉiĝo laŭ formo kaj enhavo.

Precipe gravan signifon por la plua disvolviĝo de la socialisma demokratio havas la Tezaro pri transigo de ŝtataj funkcioj al la sociaj organizaĵoj kaj movadoj. Nia lando havas bonajn spertojn tiurilate. Jam kelkaj funkcioj de la ŝtato en gravaj sociaj sferoj estis transigitaj al la sociaj organizaĵoj, kiel ekzemple la juĝfunkcioj rilate malgrandajn krimojn per la kreo de kamaradaj tribunaloj ĉe la Patrolanda Fronto, la funkcioj de la socia asekurado, transigitaj al la Sindikatoj, k. a. Bona modelo pri la kunigo de ŝtata agado kun la iniciatemo de la sociaj organizaĵoj estas la gvidado de la kulturo.

La Tezaro de CK de BKP antaŭvidas konsiderindan plifortigon de la rolo de la sociaj organizaĵoj en la socia administrado. Por la efektivigo de tiu ĉi tasko estas antaŭvidite pligrandigi la nombron de reprezentantoj de la sociaj organizaĵoj kaj movadoj en ĉiuj ĉeneroj de la socia administrado. Estas antaŭvidite ankaŭ establi kontrolon super la plenumo de ties celkonformaj proponoj kaj kritikaj rimarkigoj, plibonigi la laboron de tiuj organizaĵoj kun celo atingi pli amasan, aktivan kaj fruktodonan partoprenon de la laboruloj en la diskutado kaj solvado de la plej gravaj problemoj, pri disvolvado de la nacia mastrumo, de la scienco, tekniko kaj kulturo kaj pri la perfektigo de la socia administrado, aktive helpi per siaj specifaj formoj kaj rimedoj la batalon kontraŭ la trouzo de alkoholo kaj de tabakfumado fare de la plenaĝuloj kaj por komplementa sobreco de la junularo.

En la Tezaro estas detale pritraktita la rolo kaj la signifo de la plej gravaj sociaj organizaĵoj en nia lando — la Patrolanda Fronto, la Bulgaraj Sindikatoj kaj la Dimitrova Komunista Junulara Unuiĝo (Komsomolo).

Kiel socia kaj kultura movado la E-movado en nia lando, organizita en BEA, ankaŭ plialtigos sian rolon kaj donos sian kontribuon por la plua florado de nia socialisma demokratio.



VERDA TABULO

K-do STOJAN VOJĈEV — membro de Esperanto-societo „Libero“ en urbo Ruse, tre aktive laboris dum la abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto“ por 1976 j. kaj kolektis 192 abonojn. Evidente li okupis la unuan lokon en la abonkampanjo.

Sinceran dankon al k-do Vojĉev pro lia sindona, modela laboro!



Poezio kaj belestro

Nikolaj Zidarov

AL LA PARTIO

Panjo de sangaj rajdistoj!
La vent'
de l'ribelo ĉu fajfas ankoraŭ?
Ree ĝisnokte falk' ŝvebas nun ĉe l'firmament',
serĉas heroojn ankoraŭ.
Ŝvebas ĝi super la rokoj,
volas en kamp', en makisoj profundaj
ombri per siaj flugiloj sunlokojn.
kaj lavi puraj iliajn vundojn.

Ili ne estas plu, panjo!
Kuglo ne fajfas plu nun!
Nun — post batalo giganta
floras, sin fandas la revoj de l'sun'
en ĝojridetojn, en rozojn, en kantojn.
Vi konstruaĵojn altegajn starigas kun am',
en kaskadegojn vi jungas riverojn plenplenajn.
Vi ekflamigas la amon en pensoj kaj frukta ornam',
brilas en junaj ĝardenoj.

Flamon vi verŝas
en rozaltejojn, papavojn sur kamp'
kaj en la ros-brilanton.
Tra la patrujo sin portas la kant' —
kantas Danubo, Marica kaj Jantra.
Vintre, dum oni konstruas en frosto kaj vent',
dum la somero en verdaj kamparoj —
ĉe ajn, ĉiam mi estos kun vi kun amsent',
estos kun mi ĉiam vi, viaj faroj!

El la bulgara: Simeon M. Simeonov

Cano Todorov Ignev

ESPERANTO EN LA MALLIBEREJO DE SLIVEN

Antaŭ la Dua Mondmilito ne en ĉiuj landoj Esperanto disvastigis tiel, kiel ĉe ni. En Bulgario dank' al la korekta linio de Lenin kaj G. Dimitrov, efektivigata de la Bulgara Komunista Partio, Esperanto estis studata precipe de progresemaĵoj. Grandan meriton por tio havis la Laborista Esperanto-Asocio (LEA), sub kies gvido estis eldonitaj libroj, lernolibroj, vortaroj kaj lerniloj por laboristoj kaj homoj kun malalta instruiteco.

La internacia lingvo Esperanto estas esence ligita kun la progresema ideo pri interkompreniĝo kaj paco sur la

tero. Tian ideon povis entuziasme alpreni nur progresemaĵoj. Aliflanke la E-societoj tiam estis bonega formo por ideo edukado kaj organizado de la junularo. Kiu el ni, junuloj tiutempe, ne kantis entuziasme en E-kunvenoj, vesperamuzoj kaj ekskursetoj „Kamarada-n kanto-n“ de Georgi Kirkov, tradukitan en Esperanton?

De la sago de pagano,
ĝis maŝinmotor',
ĉion faris pen' de l'mano,
vivu la labor'!

Tiu atmosfero, kreita en la bulgara E-movado antaŭ la Dua Mondmilito,

donis siajn pozitivajn rezultojn. Ne estas do mirige, ke antaŭ la 9 de septembro 1944¹ granda parto de la partizanoj, politikaj malliberuloj, koncentrejoj kaj nelegalaj partiaj funkciuloj estis esperantistoj aŭ simpatiantoj de Esperanto.

Oni kun fiero portis la verdan stelon, kaj tio estis sufiĉa por fidi al la homo, kompreni, ke li estas progresema, antifaŝisto. Mi rememoras ekzemple la jenon.

Foje en u. Loveĉ oni demandis Stojan Ĉuŝkov — laboriston-esperantiston kaj multfojan sekretarion de la loka E-societo „Espero“:

— Kial via stelo estas verda?

— Ĉar ĝi estas verda, — li respondis trankvile.

— Tamen kial? — oni insistis.

— Ĉar ĝi estas verda, — emfazis Stojan. — Kiam ĝi maturiĝos, ĝi fariĝos ruĝa.

Tiuj vortoj de la kuraĝa laboristo-esperantisto esprimis la pensojn kaj sentojn de ĉiuj junuloj, kiuj portis la verdan stelon surbruste kun la revo, ke baldaŭ ili portos ankaŭ la ruĝan stelon.

Ĉi tutan deflankiĝon de la temo mi faris intence — por ke oni komprenu, kial Esperanto trovis bonan grundon ne nur en la malliberejo de Sliven, sed ankaŭ en ĉiuj prizonoj kaj koncentrejoj en nia lando dum la tempo de la faŝismo kaj kapitalismo. Kaj kiel sciante, ili ne estis malmultaj.

Paralele kun la plifortiĝo de la faŝisma diktaturo kaj kruela persekutado de ĉiuj progresemaj ideoj, estis persekutata ankaŭ la internacia lingvo Esperanto. Estingiĝis la oficiala E-vivo ĉe ni. Por la faŝisma polico Esperanto kaj la komunismo signifis la samon. Mi rememoras multajn tiajn okazojn, ligitajn kun mi kaj mia E-agado.

En la printempo de 1942, estinte soldato en urbo Skopije — Makedonio, mi estis arestita de la polico. En mia persona pakaĵo, inter la diversaj aĵoj

kaj libroj oni trovis ankaŭ kelkajn presaĵojn kaj manuskriptojn en Esperanto. (Tiam mi provis fari tradukojn kaj ni redaktis la E-bibliotekon „Espero“). La faŝistoj ekpensis, ke ili trovis danĝerajn konspirmaterialojn, tial ili igis min skribi sur ĉiun libron kaj folion „Tio estas mia“ kaj subskribi min. Poste la esplorjuĝisto validigis per la stampilo ĉiun mian subskribon, por ke mi ne rezignu pri ĝia aŭtentikeco. Post la liberiĝo de la lando iuj el tiuj materialoj falis en miajn manojn kaj mi ilin posedas, konservante ilin por la estonta E-muzeo. Tiuj materialoj elokvente parolas pri la rilato de la faŝistoj al Esperanto.

En la malliberejo de Sliven mi alvenis en junio 1942. En ĝi estis politikaj malliberuloj nur el la procesoj en la armeo, kiuj abundis en tiu jaro. En la aliaj malliberejoj ordinare estis malnova kerno, en kiu ankaŭ spertaj esperantistoj. Sed ni, la unuaj politikaj malliberuloj tie, estis ĉiuj junaj, de diversaj randoj de la lando, de diversaj armeunuoj de „nova“ kaj „malnova“ Bulgario, nekonantaj unu la alian. Multaj el ni tamen, kune kun la entuziasmo de la junkomunistoj, portis ankaŭ la ideojn de Esperanto. Ni, la pli spertaj esperantistoj, estis certaj, ke ni trovos multajn samideanojn ankaŭ en tiu sfero.

Sed kiel ekkoni nin? Serĉi „samideanojn“ — tio estas karakteriza trajto de la esperantistoj. Plej ofte ni rekonas nin laŭ la kvinpinta verda stelo. Sed sur la grizaj malliberulaj vestoj nenie oni povis vidi verdan stelon. La mallibereja estraro severe malpermesis tion. La elserĉado de la esperantistoj estis malfacila ankaŭ pro tio, ke ni, malgraŭ kolektitaj unu apud alia, tage estis tenataj en ŝlositaj ĉeloj, kaj la promonadoj en la kvarangula korto estis mallongaj kaj en vicoj. Malfacile estis ŝanĝi sian lokon dum la moviĝado sen esti rimarkita de la kontrolistoj. Kaj malgraŭ ĉio ni eltrovis nin. Ni eltrovis nin ŝajne laŭ sento, ni montris nin unu al la alia kaj interkonatiĝadis.

Samtempe kun la konatiĝado ni el-

¹ Dato de la liberiĝo de Bulgario elsub la faŝismo kaj kapitalismo.



provis ankaŭ niajn parolkapablojn. La nivelo estis tro diferenca. Iuj relative bone regis la lingvon, aliaj estis lernintaj ĝin delonge kaj sciis nur po vortodu aŭ frazo. Sed la dezirantoj lerni la lingvon — sennombraj! En kelkaj ĉeloj, kie estis pli aktivaj esperantistoj, oni jam estis komencintaj lerni la lingvon grupe. En multaj ĉeloj la lernado de Esperanto estis inkluzivita en la kleriga laboro. Tiu ĉi iniciato plivastigis kaj baldaŭ preskaŭ ne estis ĉelo sen lernado de la lingvo.

Sed aperis nova malfacilaĵo: ĉiu lektoro laŭ sia maniero instruas la lingvon, kalkulante je tio, kion li estis lerninta ekstere. La malbono konsistis en tio, ke mankis lernolibroj, vortaroj k. s. La estraro de la prizono malpermesis ĉiajn ajn E-materialojn. La esperantistoj estis persekutataj preskaŭ kiel plej danĝeraj komunistoj. Esperanto estis konsiderata io infekta kaj tre malbona.

Jen interesa okazo. Ni okupis nin memstare en la ĉelo — ĉiu laŭ sia intereso kaj ebleco. Subite la ĉelon eniris iu el la malliberejaj ĉefoj, oficiro. Ordinare ni komprenadis, kiam venas „danĝero“, kaj ni kaŝadis ĉion, sed li eniris neatendite kaj trafis ĉion tiel, kiel ĝi estis sur la tabullitoj. Post li — la pordo-ŝlosistoj kiel fidelaj ĉashundoj. La oficiro komencis atente kontroli, pri kio okupiĝas ĉiu. Venis ankaŭ al mi. Mi sidis en angulo kaj tradukis ion en Esperanton. Li kun furioza rapideco ekkaptis miajn skribaĵojn, trarigardis ilin atente kaj demandis min kun la necesa severeco, rigardante min rekte en la okuloj, por ke mi ne povu trompi lin:

— Kio estas tio?

— Esperanto! — mi respondis trankvile.

Li kvazaŭ hirtiĝis, retiriĝis iom malantaŭen kaj komencis min insulti kaj konvinki pri la senutileco kaj danĝereco de tiu afero, blasfemis mian lingvon.

— Esperanto estas hebrea, framaŝona lingvo! — elbuŝigis li kaj liaj salivoj elflugis kune kun la paroloj.

Liakruela prijuĝo de Esperanto montis ankaŭ lian simplecon kaj malklercon. Aliflanke, tio parolis, ke se la malamiko tiel kruele sin ĵetas kontraŭ Esperanton, tio signifas, ke ĝi estas io bona!

La ĉefo prenis ĉion, pri kio ni okupigis, kaj foriris al la aliaj ĉeloj „ĉasi“ malpermesitajn librojn kaj materialojn. Sed tio ne plu estis ebla por li. Pere de nia speciala „morso“ ni sciigis en ĉiuj direktoj pri la danĝero.

Malgraŭ la malpermeso de Esperanto en la malliberejo, ni sukcesis enporti E-lernolibrojn, vortarojn, alian literaturon. Kune kun kelkaj verkoj de Zamenhof ni havis ankaŭ iujn tradukojn en Esperanton, kiuj helpis nin ne nur ekregi la lingvon, sed ankaŭ nian ideologion: „Komunista manifesto“ de Karlo Marks kaj Fridrih Engels, „Bostono“ de Sinkler, „Ĉu nova milito?.. Jes! Kial?“ k. a. Mi ricevis ankaŭ kelkajn ekzemplerojn de mia kompatinda traduko de „Baj Ganju“.

La E-parolo komencis ĉiam pli ofte soni dum niaj promenadoj en la korto. Sed evidentigis, ke multaj elementoj de la lingvo estas lernitaj erare. Ape radis multaj problemoj lige kun la uzado de la akuzativo, de prepozicioj, sufiksoj ka. Sed estis ebleco nek por kvalifikigo de lektoroj, nek por diskutado de similaj problemoj.

Ni, la plej progresintaj esperantistoj, decidis krei ordon en tiuj aferoj. Tial ni petis la partian gvidantaron en la malliberejo permesi al ni eldoni mane skribitan E-ĵurnalon, kiu ĉirkaŭiru la ĉelojn kaj helpu la gvidantojn de E-kursoj. Tion oni permesis, kaj ni komencis eldoni la ĵurnalon.

Ni estis en unu ĉelo kun Stajko Stojkov Stajkov el Varna, kiu ankaŭ relative bone regis la lingvon. Ni ambaŭ komencis redakti la ĵurnalon. Ni skribis ĝin mane jen per ordinaraĵoj, jen per presliteroj, kaj cirkuligis ĝin inter la esperantistoj en la ĉeloj.

Mi ne memoras, ĉu tiu ĵurnalo havis titolon, numerigojn kaj datojn, sed laŭ enhavo ĝi ĉiam estis interesa kaj varia.

En ĝi estis konstantaj rubrikoj: „Lingvaj demandoj“, „Legaĵoj“, „Kantoj“, „Sciigoj“ k. a. En „Legaĵoj“ ni enmetis ankaŭ niajn tradukojn, tre ofte sovetaĵojn kaj bulgaraĵojn revoluciajn kantojn, kiuj estis parkerataj kaj kantataj entuziasme en Esperanto.

De la ĵurnalo konserviĝis eĉ ne unu numero. Foje la prizonadministracio decidis fari tutecan kontrolon de la malliberejo por trovi librojn kaj nelegalajn materialojn. Sub preteksto, ke oni purigos la ĉelojn kontraŭ cimoj, kiuj abundis, la gardistoj ordonis, ke ni elportu ĉion sur la korton, kaj komencis esplori pecon post peco, samtempe traserĉante ĉiun ĉelon aparte kaj plej atente. La partia gvidantaro decidis, ke estu neniigitaj ĉiuj materialoj kaj libroj de malpli granda signifo, por konservi la plej necesajn. Kaj plej necesaj estis la materialoj, ligitaj kun nia ideo memklerigado. Kun granda doloro ni neniigis ne nur la numerojn de nia E-ĵurnalo, sed ankaŭ aliajn materialojn, ligitajn kun nia E-laboro en la malliberejo. Bedaŭrinde! Nun ili povus esti bonegaj eksponaĵoj en nia muzeo.

Iujn el la tradukoj ni skribis en malgrandaj notlibretoj etlitere kaj dense, por ke oni povu facile ilin kaŝi kaj elporti. Unu el tiuj notlibretoj mi, malgraŭ ĉio, sukcesis konservi kaj kune kun aliaj materialoj transdoni al la muzeo. Sed kiom da tradukoj, kantoj kaj aliaj materialoj forbrulis aŭ estis konfiskitaj de la mallibereja administracio!

Malgraŭ ĉio, ankaŭ post la granda traserĉo, nia E-agado ne ĉesis. La savitaĵo denove multobligis kaj denove ekiris de ĉelo al ĉelo kaj de esperan-

tisto al esperantisto.

Multaj kamaradoj ellernis bone la internacian lingvon Esperanto dum sia restado en la malliberejo. Ni tamen ne havis aliajn eblecojn praktiki ĝin, krom en la konversacioj, okazantaj dum la promenadoj en la mallibereja korto, kaj en la legado de literaturo. Krei kontaktojn kun esperantistoj el nia lando aŭ el eksterlando estis neebla pro du kaŭzoj: unue — ĉar E-korespondado estis malpermesata kaj fakte neebla dum la milito kaj due, ĉar oni permesis al ni sendi nur unu leteron dum du monatoj, kaj ni preferis skribi al niaj gepatroj kaj familioj. Granda parto el la partoprenantoj de niaj E-kursoj ne sukcesis ellerni bone la lingvon, sed ili por ĉiam restis ĝiaj bonaj amikoj kaj helpantoj.

Interesa estis la mateno de la 9 de septembro 1944, kiam venis la libero. Antaŭ ol foriri al niaj naskiĝlokoj ni kuris de ĉelo al ĉelo, brakumis nin adiaŭe, notis adresojn. Ni promesis al ni, ke nia korespondado en Esperanto neniam ĉesos, ke ni neniam forgesos nin. Sed en la liberiginta patrolando antaŭ ni ekstaris grandegaj kaj malfacilaj taskoj: definitive rompi la reziston de la faŝisma burĝaro, perdinta la regpotencon, firmigi la nacian defendon, konstrui la fundamenton de la nova socialisma ekonomia sistemo ĉe ni. Ni fordonis ĉiujn fortojn al tiuj taskoj kaj por Esperanto kaj E-korespondado restis malmulta tempo. Sed ĉiam, kie ajn ni estis post la 9 de septembro 1944, ni ne ĉesis propagandi nian karan lingvon Esperanto, labori por ĝia disvastigo en nia socialisma Patrujo.

Korektu gravajn erarojn en „BE“, faritajn de la presistoj ĉe la manipuladoj en la lasta momento, sen la scio de la redakcio:

en n-ro 1, paĝo 10, la titolo en malgranda parto de la eldonkvanto havas eraron — devas esti: „Ruse — nia kongresurbo“:

en n-po 2, paĝo 10, plej supre devas esti la konstanta kliŝeto „Lingvaj demandoj“, sed oni kompostis ĝin kun terura eraro.

La redakcio petas pardonon pro tiuj tedaj eraroj!



ДНЕВЕН РЕД

НА 39-ИЯ КОНГРЕС НА БЪЛГАРСКИЯ ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ

Русе, 10—12 юли 1976

1. Отчетен доклад на ЦК на БЕС.
2. Отчетен доклад на Централната контролна комисия.
3. Изменения в устава.
4. Избор на ръководни органи.

ИЗМЕНЕНИЯ

в устава на БЕС, приет на 38 конгрес в Смолян

Бюрото на ЦК на БЕС в заседанието си от 19. I. 1976 г. (протокол № 1) реши да предложи на конгреса в Русе някои целесъобразни промени в устава, който е в сила сега. Ето предложенията за изменения:

Сегашен текст:

Нова редакция:

ВЪВЕДЕНИЕ

Отпада изцяло.

I. Цел и задачи

I. Цел и задачи:

Чл. 1. Българският есперантски съюз е доброволна културно-просветна организация на есперантисти в България, съществуваща въз основа на чл. 52, ал. I от Конституцията на НР България, с цел:

а) да разпространява международния език есперанто като средство за международни връзки;

б) да използва есперанто за запознаването на есперантистите от цял свят със строителството на социализма в НР България, с материалния и културен напредък на нашия народ;

в) да възпитава своите членове в дух на патриотизъм и пролетарски интернационализъм, на привързаност към лагера на социализма и мира, като използват есперанто за укрепване и разширяване връзките с другите народи; да съдействува със всичките си сили за запазване на мира в света;

г) да ръководи и да контролира всичко, което се отнася до езика есперанто и есперантското движение в страната;

д) да улеснява членовете си при практическото използване на есперанто;

Чл. 2. За осъществяване на своята цел Българският есперантски съюз провежда следните мероприятия:

а) издава печатни органи;

б) ръководи агитацията и пропагандата на есперанто;

в) чрез събрания, печатни материали, курсове и други средства възпитава своите членове в принципите на социалистически патриотизъм в интернационализъм и работи за издигане на тяхната култура, идейно-политическо равнище и владенето на есперанто;

Чл. 1. Българският есперантски съюз, основан през 1907 г., е доброволна културно-просветна организация на българските есперантисти и съществува въз основа на чл. 52, ал. I от Конституцията на НР България с цел:

а) да разпространява международния език есперанто като средство за международни връзки в дух на разбирателство, взаимно опознаване и взаимно доверие;

б) да използва есперанто за информиране на чуждестранните есперантисти относно материалния и културен възход на нашия народ, миролюбивата външна политика на НР България;

в) да възпитава своите членове в дух на патриотизъм и дружба между народите; да съдействува със всичките си сили за запазване на мира в света;

г) да обединява и ръководи всичко, което се отнася до езика есперанто и есперантското движение в страната;

д) да улеснява членовете си при практическото използване на есперанто;

Чл. 2. За осъществяване на своята цел Българският есперантски съюз провежда следните мероприятия:

а) издава печатни органи;

б) ръководи агитацията и пропагандата на есперанто;

в) чрез събрания, доклади, печатни материали, курсове, семинари и други средства провежда идейно-възпитателна работа за издигане на културното и езиковото равнище на своите членове;

г) грижи се за съставяне и издаване на учебници, помагала, книги, списания, литература за и на есперанто;

д) събира статистически и исторически данни за есперантското движение в страната;

е) влиза във връзка за съвместна дейност с организации, които биха допринесли за осъществяване на целите на Българския есперантски съюз;

ж) подпомага различни организации за установяване на контакт със сродни организации в чужбина;

з) влиза във връзка с есперантски организации в други страни за общи мероприятия.

Чл. 12. Между конгресите могат да се свикват (при необходимост) от централния комитет на БЕС национални, окръжни и районни конференции. Националните конференции имат право да извършват промени в състава на централните органи на Съюза.

Забележка: Вместо Централен (окръжен) комитет навсякъде в устава да се впише Централно (окръжно) ръководство.

г) грижи се за съставяне и издаване на учебници, помагала, книги, списания, литература за и на есперанто;

д) събира статистически и исторически данни за есперантското движение в страната;

е) членува колективно в Отечествения фронт и влиза във връзка с организации, които биха допринесли на целите на Българския есперантски съюз;

ж) подпомага секциите си за установяване на контакт със сродни организации в други страни за общи мероприятия;

з) членува в Универсалната есперантска асоциация (UEA) и оказва всестрани подкрепа на Световното есперантско движение за мир (MEM).

Чл. 12. Между конгресите могат да се свикват (при необходимост) от централното ръководство национални окръжни и междуокръжни конференции. Националните конференции имат право да извършват промени в състава на централните органи на Съюза.

NIAJ JARKUNVENOJ

Pârvomaj — E-societo „Zamenhof“.

Raporton pri la societa agado faris la prezidanto Cvetilov. Post vigla diskutado oni akceptis novan agadplanon kaj elektis estraron: prezidanto Dinko Ŝiŝkov, vicprezidanto — Cv. Cvetilov, sekretario — D. Ljangozova, kasisto — D. Trendafilov, membro — Samuil Panajotov.

Oni decidis duobligi la membraron (de 15 je 30). Ĝojiga fakto: la individuaj membroj de Bulgara E-Kooperativo plialtigis siajn sumojn per 200 levoj.

D. Ŝiŝkov

Ŝumen — „Vekiĝo“. La jarkunveno okazis en la nova klubejo, disponigita de la Urba Soveto. Gastis reprezentantoj de DK de BKP, UK de Patrolanda Fronto, el E-societo „Verda Eskadrono“ — Târgoviște.

Raporton faris la prezidanto Atanas Bojaĝiev. Dank' al sia aktiva varia agado „Vekiĝo“ okupis indan lokon en la kultura kaj socia vivo de la urbo. Tre bonaj rilatoj kreiĝis inter la esperantistoj de Ŝumen kaj la esperantistoj el la urboj kun kiuj ĝi ĝemeliĝis — Herson (USSR), Debreceno (Hungario), Magdeburg (GDR). Pro sia multjara aktiva laboro serve al la paco E-societo „Vekiĝo“ estis honorita per la ora pacmedalo de la Nacia Pacdefenda Komitato.

Inĝ. Marija Koleva — prezidantino de UK de Patrolanda Fronto, salutis varme la mem-

brojn de „Vekiĝo“, dankis ilin pro ilia ĝisnuna tre utila laboro kaj bondeziris novajn sukcesojn.

Prezidanto de la novelektita estraro estas Cvjatko Todorov, sekretario — d-ro Ĵelez Tonev.

Cv. Stojanov

Sofio — „Heroldo“. Raporton pri la tre aktiva agado de la societo faris ĝia prezidanto Paskal Pârvanov. Oni serĉis formojn por pliintimigi la membrojn — per kolektiĝoj en domoj de aktivuloj, komunaj vizitoj de spektakloj, dolĉaĵejo, vilaoj k. a., oftaj projekciadoj de diapozitivoj, faritaj de la membroj en nia kaj aliaj landoj, okazigo de konversaciaj vesperoj kaj traktado de lingvaj demandoj sub la gvido de Asen Grigorov k. a.

En la diskutado oni emfazis la neceson serĉi novajn formojn de propagando de Esperanto, amase korespondi kaj krei kontaktojn kun eksterlandaj esp-toj.

En sia salutparolado la reprezentanto de DK de BEA Georgi Miĥalkov substreki la bonan ĝisnunan laboron de „Heroldo“ kaj la neceson fari ĝin ankoraŭ pli aktiva lige kun la antaŭstarantaj XI kongreso de BKP kaj la 39 nacia E-kongreso.

Konsisto de la novelektita estraro: Paskal Pârvanov — prezidanto, Katja Maneva — vicprezidanto, Stefan Sokolov — sekretario, Veska Nakova — kulturkleriganto, Koljo Mazkov — kulturamasa agado, Dimitro Sokolov — kasisto, Ivanka Nedeva — membro.

V. Nakova



Marica — „Trakia Lumo“. Raporton pri la societa agado faris la prezidanto Todor Kurtev, montrante la bonajn atingojn kaj ne kaŝante la mankojn. En 1975 la societa membraro kreskis je 100% kaj atinigi 76. Malfermitaj 3 kursoj kun 47 partoprenantoj, funkcias parolanta rondo. Por 1975 j. nur 7 abonoj al „Bulgara Esp-isto“, por 1976 — 30. En 1975 al la Internaciaj E-Kursoj en Burgas estis senditaj 3 personoj. Aktivaj ligoj kun la esperantistoj el Rostock (GDR).

Rekomendoj: organizi pli bone la ekskursan agadon, insisti pri E-kurso pere de la televido ka.

Gastoj de la kunveno el DK de BEA — Ĥaskovo estis k-doj Nikola Pilev kaj Nikola Uzunov. N. Pilev verve salutis la societanojn kaj alvokis al ankoraŭ pli aktiva E-agado dum la kongresa jaro kaj aparte lige kun la III Internacia Arkeologia E-Brigado, kies dom-mastro estos E-societo „Trakia Lumo“.

P. Kartalev

Gabrovo — „Verda Torĉo“. La jar-kunevo okazis en la „Verda Salono“ de la Sindikata Kulturdomo „Emanuil Manolov“. Gastoj estis k-do Dimitro Dunĉev el DK de BKP kaj Stefan Georgiev — prezidanto de UK de Patrolanda Fronto.

El la raporto kaj diskutado evidentiĝis bona laboro de la societa estraro. La membraro plimultiĝis, la aŭtoritato de „Verda Torĉo“ kreskas“.

Prezidanto de la novelektita estraro estas inĝ. Ivan Petrov.

Inĝ Ĥr: Mandev

Girpan — „Mondamikeco“. La priagada raporto de la prezidanto Petro Stefanov kaj la diskutoj montris bonan laboron de la societo dum la pasinta jaro. La membraro kreskis al 60, la societo ĝuas favoran rilaton kaj helpon de la lokaj partiaj kaj ŝtataj aŭtoritatoj. Nesufiĉa estis la kursa agado.

La prezidanto de DK de BEA R. Ĉipilev taksis la societan agadon kiel tre sukcesan kaj donis rekomendojn por ĝia plua plibonigo.

Ivan Peev

Sofio — „Diĉo Petrov“. La jar-kunveno okazis en la Centra Domo de la Instruisto. Raporton pri la agado faris la prezidanto Kunĉo Valev. La societo okazigis ĉiusemajnajn kunvenojn kun varia temaro — lingvaj kaj metodikaj demandoj, temoj de ĝenerala kultura kaj scienca intereso, impresoj el veturadoj eksterlanden ktp. Kelkfoje gastis alilandaj esperantistoj. La societo disponigas organizajn kaj metodikajn kadrojn por la titjaraj korespondaj kaj la 20-tagaj internaciaj E-kursoj en Burgas, organizitaj de CK de BEA pere de ĝia Instruista Sekcio kaj Sofia DK. Nesufiĉa estas la kursa laboro kaj lige kun tio — la alfluo de novaj junaj fortoj.

La reprezentanto de DK Nano Nanov donis rekomendojn por la estonta laboro.

Nova estraro: Kunĉo Valev — prezidanto, Jordan Markov — vicperzidanto, Flori Nikolov — sekretario, Jordanka Georgieva — kulturkleriga laboro, Miron Berberov — kulturamasa laboro, Georgi Miĥajlov — kasisto Kiril Rizov — membro.

F1. Nikolov

NOVAJ ESPERANTO-KURSOJ

Borovo, distrikto de Ruse. Aktive laboris por organizi E-kurson la prezidantino de la Patrolanda Fronto Janka Iv. Milanova — nova entuziasma esperantistino. Kursgvidantino — Tonka Todorova — pasintjare diplomita kiel E-instruistino en la Internaciaj E-kursoj en Burgas. La kurso funkcias ĉe la kulturdomo. Partoprenis precipe gejunuloj.

Etropole. Post bona preparlaboro per la helpo de UK de Komsomolo en la urbo estis organizita junulara E-kurso. Ĉe la malfermo Kunĉo Valev — sekretario de CK de BEA, parolis pri la rolo kaj signifo de Esperanto. Kun demonstracia celo li faris ankaŭ la unuan lecionon. Al la kurso aliĝis 20 gejunuloj. Kursgvidanto estas Temenuga Ovĉarova — loka instruistino.

Svoĝe. Post la jara kunveno de la malgranda loka E-societo la E-agado reaktiviĝis. Dank' al la obstina laboro de la nova esperantistino Elena Radenkova estis malfermita kurso por komencantoj kun 19 partoprenantoj. La taskon gvidi ĝin prenis sur sin la sindona E-veterano d-ro Stojan Moraresku el Sofio, kiu ĉiusemajne veturas al Svoĝe por la lecionoj.

Blagoevgrad — „Espero“. Dank' al aktiva propagando de Esperanto en la urbo ekfunkciis E-kurso por komencantoj sub la gvido de Ana Angelova — instruistino. Partoprenas 20 gekursanoj de diversaj aĝoj.

Târgoviște — „Verda Eskadrono“. Ĉe la societoj funkcias la jenaj kursoj:

1. Por komencantoj — 22 civitanoj, gvidanto Raŝko Nenov.

2. Por progresintoj — por la E-aktivularo. Gvidantoj M. Rajčeva, I. Ivanov, D. Todorov. Oni prelegas pri lingvaj demandoj, traktas materialojn el E-gazetaro, libere konversacias.

Krome en fundamenta lernejo „N. Vapcarov“ funkcias 2 fakultativaj klasoj po 20 lernantoj sub la gvido de la diplomita E-instruistino Maria Rajčeva.

Vintra promenado — ankaŭ bona E-aktiveco

Serĉante novajn formojn por variigi kaj aktivigi la E-vivon, la estraro de E-Societo „Verda Eskadrono“ en Târgoviște organizis vintran promenadon al la monto. Soifante E-medion, kolektiĝis multaj partoprenantoj. Oni senlace grimpis laŭ la neĝokovritaj vojetoj, ĝuis la fabelan vintran panoramon.

Kolektiva tagmanĝo en idilia montodomo, vizito de la televidturo, ofta klakado de la fotoaparatoj. Tutan tagon sonis E-parolo, kantoj kaj vivĝoja rido.

Similaj promenadoj — certe en ĉiuj sezonoj! — estas duoble utilaj: en amika E-rondo meze de la naturo oni firmigas la sanon kaj perfektigas sin en la lingvo.

Petro Petrov

VESPERO PRI STEFAN KIRAĜIEV

En la Centra Domo de la Instruisto la Sofia E-Societo „Diĉo Petrov“ organizis vesperon dediĉe al sia forpasinta membro Stefan Kiraĝiev — multjara popola instruisto kaj lerneja inspektoro, sindona esperantisto-veterano kaj elstara tradukisto de poezio en Esperanton. En la prezidantaro sidis la edzino kaj la du filoj de la forpasinto.

Skize pri lia vivo kaj agado parolis lia eksa samlernanto kaj amiko Vâskresen Anastasov. Membroj de la societo recitis originalajn kaj tradukitajn verkojn de Kiraĝiev.

La filo de la forpasinto — Svetlin — esprimis la familian dankon pro la kortuŝa aranĝo. (vd. lafoton).

K. I.



EN KUBRAT — VARE-76

La 31-an de januaro u. Kubrat denove farigis centro de grava E-evento — la tradicia Vintra Amika Renkontiĝo Esperantista (VARE) dediĉita nun al la XI kongreso de BKP kaj la 20-jariĝo de E-societo „Progreso“ en Kubrat. Partoprenis 110 esp-stoj el pli ol 10 loĝlokoj de distriktoj Razgrad, Ruse, Târnovo, Silistra.

La renkontiĝon malfermis Anton Antonov — membro de la organiza komitato de VARE. Salutis k-do Janko Velkov — sekretario de UK de BKP. Salutparoladojn faris ankaŭ la reprezentantoj de ĉiuj E-societoj.

Koncizan raporton pri la 20-jara vivo de „Progreso“ faris ĝia prezidanto Ĥristo Dimitrov. Aparte notinda estas la internacia aktiveco de la societo — multaj ĝiaj membroj partoprenis E-aranĝojn en alilando, akceptis eksterlandajn gastojn ktp.

Komuna vespermanĝo okazis en restoracio „La Tilioj“. Ĝis la 2-a post noktomezo daŭris la plezuriga varia programo — dancoj, ludoj, tombolo, ka.

La sekvan tagon — programo en la koketa arbardomo meze de la naturo. Denove kantoj, ludoj, babilado. Originalajn versaĵojn legis la E-veterano Boris Kavalĝiev el Ruse.

Bonege funkciis E-bazaro sub la gvido de la E-aktivulo Zair Aŝimov. La bazaro disponigis al la esperantistaro E-memortranĉiletojn, flagetojn, insignojn, emblemojn, dialogarojn, lernolibrojn, kantaretojn, gramfondiskojn k. a.

Ĉiuj disiĝis per „Ĝis revido!“ en VARE 1977.

Anton Antonov

letervesperon de la esperantistoj-instruistoj aranĝas la Sofia Instruista E-Societo „Diĉo Petrov“ la 1-an de junio 1976. La membroj atendas multajn leterojn de instruistoj el ĉiuj landoj. Se eble, en la koverton enmetu ankaŭ 3 bk pri fama loko en via lando, pri via loĝloko kaj pri interesa popolkostumo. Al ĉiuj sendintoj E-societo „Diĉo Petrov“ respondos laŭ la sama maniero. Tio povas esti komenco de interesaj, utilaj kaj daŭraj rilatoj. Skribu amase! Anticipan dankon!

Adreso: Bulgario, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97, Instruista Sekcio de Bulgara Esperantista Asocio.



TRA LA E★ MONDO

XAV kongreso de KPSU

SIBERIO — ĈEFA OBJEKTO DE LA DEKA KVINJARA PLANO

La nova Dekaj Kvinjara Plano de Sovetunio antaŭvidas, ke la orientaj regionoj de la lando donu la tutan pligrandigon de nafto, natura gaso kaj aluminio, pli ol 90% de la pligrandigo de ŝtonkarboj, 45% de la pligrandigo de la celulozproduktaĵo ktp.

Estis tempo, kiam ĉefan rolon en la ekonomia disvolvigo de Sovetunio ludis ĝia eŭropa teritorio. Ankaŭ nun sur tiu ĉi teritorio estas koncentrita la baza industria potenco de USSR, sed la ekonomia disvolvigo en ĝi estas efektivigata ĉefe per teknika rearmigo, rekonstruado kaj modernigo de la entreprenoj. La nova konstruado ĉiam pli translokiĝas orienten. Ĉiam pli estas sentataj la akcelitaj ritmoj de disvolvigo de Siberio. La komenco estis metita antaŭ dekoj da jaroj per la ŝtonkarba baseno de Kuzneck. Aperis ankaŭ la unuaj grandaj industrientreprenoj kaj elektrocentraloj. Dum la lastaj 30 jaroj la industriproduktaĵo de Siberio kaj de la Malproksima Oriento kreskis preskaŭ 20-oble. Tiuj nekonataj ritmoj aliformis la teritorion de la iamaj „mortaj siberiaj kampoj“, sur kiuj naskiĝis tute nova potenca moderna industrio, elkreskis nesignitaj sur la karto de USSR novaj urboj kaj loĝlokoj.

Ĉiam, kiam mi vojaĝis tra la teritorio apud la siberiaj riveroj Angara kaj Enisej, kie nun formiĝas la plej grandaj teritoriindustriaj kompleksoj, mi admiris la unikajn laŭ sia potenco novkonstruitajn kaj konstruatajn objektojn. Tio estas la elektrocentraloj de Bratsk kaj Ust-Ilimsk ĉe Angara, la elektrocentralo ĉe Enisej, kiu per sia potenco de 6 milionoj da kilovatoj nun ne havas egalan en la tuta mondo, la elektrocentralo de Sajani-Ŝuŝekskoe, kiu ankaŭ estas konstruata ĉe Enisej kaj havos potencon de 6,4 milionoj da kilovatoj. Ĝuste ĉirkaŭ tiuj ĉi potencaj koroj de Siberio estas konstruitaj kaj konstruataj la novaj unikaj objektoj de la estontaj teritoriindustriaj kompleksoj — la alumina uzino apud Bratsk, la celuloza kombino apud Ust-Ilimsk, la vagonuzino apud Krasnojarsk k. m. a.

Dum la jaroj de la Dekaj Kvinjara Plano

Okcidenta Siberio transformiĝos en gigantoan teritoriindustrian komplekson kaj ĉefan bazon de la lando por nafto kaj gaso. Je la fino de la Kvinjara Plano la jara akiraĵo de nafto atingos 200-310 milionojn da tunoj, kaj de natura gaso — 115-145 miliardojn da kubometroj. Surbaze de tiuj ĉi akiraĵoj oni konstruas la naftokemiajn kombinumojn en Tomsk kaj Tobolsk, novajn nafto- kaj gaskondukilojn, fervojojn.

Sed la potencoj, kiuj jam estas kreitaj en Siberio, tiuj, kiuj nun estas konstruataj kaj konstruotaj, estas karakterizaj ne nur pro siaj grandegaj skaloj. Ili distingiĝas antaŭ ĉio per sia nova kaj perfekta tekniko, plej ofte kreita speciale en tiuj ĉi regionoj, per sia perfekta kaj progresiva teknologio. Aparte efika montriĝis la komplekca metodo de konstruado de tutaj grupoj da reciproke ligitaj entreprenoj, kiuj plene refabrikas la krudaĵojn sen iaj ajn restaĵoj, mallongigas la transportadon k. a.

La akcelitaj ritmoj de disvolvigo de Siberio estas sentataj ĉiam pli kaj pli forte. Siberio vere iĝas ĉefa objekto de la nova Dekaj Kvinjara Plano.

Jordan Tanev

JUBILEO DE AMIKO DE LA BULGARAJ ESPERANTISTOJ

En la komenco de la jaro nia soveta amiko Sergej Grigorieviĉ Rubljov fariĝis 75-jara. Ni gratulas la talentan sovetan esperantiston kaj bondeziras al li sanon kaj novajn sukcesojn en lia persona kaj socia agado, speciale en la E-tradukado.

S. Rubljov estas bone konata al la pioniroj de la laborista E-movado en Bulgario. Dum la tridekaj jaroj de nia jarcento laŭ lia lernolibro de Esperanto ĉe ni oni tre sukcese instruis la lingvon en kursoj, malfermitaj de la Bulgara Laborista E-Asocio (B-LEA) — membro de la Internacio de Proletaj Esperantistoj (IPE).

Post kelkaj jaroj nia veterano Asen Grigorov relaboris la ruslingvan originalon kaj faris ĝin taŭga por bulgaroj — kiel por kursoj, tiel ankaŭ por aŭtodidaktoj. Tiu lernolibro havis kvin eldonojn kaj servis en daŭro de du jardekoj al miloj da bulgaroj, kiuj lernis laŭ ĝi la Internacian Lingvon.

S. Rubljov estas kapabla tradukinto de multaj verkoj de rusaj poetoj en Esperanton, speciale de ducent fabeloj de la klasikulo de la rusa literaturo I. A. Krilov. Samtempe, kiel inĝeniero, li havas la altan titolon „honora inventisto“.

Multaj bulgaraj geesperantistoj ĝoje renkontas la 75-jaran jubileon de k-do Rubljov kun koraj bondeziroj pri plua aktiva E-agado inter la esperantistaro de Odeso, kie li loĝas.

N. Aleksiev



Li ne estis granda sciencisto, profesoro, sed Esperanto-apostolo. Franjo Smerdel havis vere esperantistan koron kaj penson de sincera internaciisto. Ĉiuj esperantistoj, kiuj pasigis eĉ unu tagon en la esperantista tendaro



en Primoŝteno ĉe Adriatika Maro, bone konas kaj neniam forgesos lin. Kiel la granda magneto tiras malgrandajn erojn de fero, tiel li altiris la esperantistojn ĉirkaŭ sin. Ĉiuvespere en la tendara arbaro estis aranĝata ja amuzaĵo, ja solenaĵo. La animo de similaj aranĝoj estis tiu apostolo — Franjo Smerdel („la Fotoservo“, kiel oni nomis lin tie). Ĉiujare certan tempon antaŭ la ekfunkcio de la tendaro Franjo jam estis en Primoŝteno, konstruis sian tendon kaj atendis la gastojn-esperantistojn. Li diras „bonan venon“, vi respondas kaj donas vian koron en la manojn de tiu ĉi apostolo. Poste vi mem serĉas lin, strebas esti pli proksime al li, partopreni en ĉiuj liaj iniciatoj.

Amiko de italoj, bulgaroj, francoj, hungaroj ĉeĥoj, rusoj. . . Sed ne estus malĝuste, se ni dirus: antaŭ ĉiuj li preferis la bulgarojn. Kiam li eksciis, ke mi estas kantisto, li preskaŭ ĉiutage, dum la aliaj ripozis, venigis min en sian tendon kaj petis min kanti. Tiel li surbendigis multajn kantojn. Aparte plaĉis al li la rusa kanto „Moskvaj vesperoj“. Oni devis vidi kiamaniere li aŭskultas tiun kanton, por kompreni, kia devas esti la sincera admiranto de la muziko.

Iun tagon li diris al mi: „Bulgario ne ek-

zistas en Primoŝteno, do ni devas fondi ĝin!“

En la internacia esperantista tendaro estis ĉirkaŭ dudek „ŝtatoj“, fonditaj de li. Se iu esperantisto volis fondi tie sian nacian ŝtaton, li devis alporti teron de sia lando, kiun teron ĉe speciala ceremonio oni enterigis en bedon, kaj poste super tiu bedo flirtis la flago de la ŝtato. Riceviĝis belega bildo: sur bone ordigitaj bedoj flirtas amike unu apud alia diversnaciaj flagoj!

Sed mi ne kunportis nian teron! Denove la amiko de la bulgaroj enpensiĝis. La sekvan momenton li diris: „Ĉu vi estas preta bruligi iun objekton, kiun vi portas el Bulgario?“ „Kompreneble!“ Tiel mi produktis cindron de Bulgario, volvis ĝin en bulgaran paperon kaj la sekvan tagon Franjo kunvenigis la esperantistan socion de la tendaro por fondi Bulgarian. Tiel ni enigis ankaŭ Bulgarian en la vicon de la esperantistaj ŝtatoj. Poste li mendis al ni, la bulgaroj, sendi al la estraro de la tendaro en Primoŝteno semon de rozo, kiu estu semita en la tiea „Bulgario“. Tiamaniere tiu lasta diferencos de la ceteraj ŝtatoj per siaj belaj rozoj. Bedaŭrinde. . .

Por ĉiu esperantisto en la tendaro Franjo Smerdel estis dommastro zorgema, atentema. Iun tagon li metas sur ies kapon la ĉapelon de la tendaro kaj diras: „Morgaŭ vi estos deĵoranto en la tendaro!“ Kaj tiu akceptas volonte, ĉar kun li deĵoros ankaŭ Franjo. Por ĉiu esperantisto li faris el la internacia tendaro propran domon.

Kiam mi forveturis, Franjo akompanis min ĝis la aŭtobuso, neproksime de la tendaro, atendis la ekveturon kaj poste longan tempon mansvingis.

Smerdel Franjo jam ne estas inter la vivaj. Sed ĉiu, kiu konis la apostolon-esperantiston, ne povas forgesi lin. Li estis modela homo, inda ekzemplo por la esperantistaro.

Franjo jam nenion povas diri, ĉar la mortintoj ne parolas. Pro tio ni memorigas ĉi tie pri tiu amiko de la bulgaraj esperantistoj kaj Bulgario.

Dimitro Denčev

La grava soveta semajna gazeto „Nova Tempo“, aperanta en ok lingvoj, publikigis en sia n-ro 44/1975 respondon al soveta leganto demandinta la redakcion pri la neceso de internacia lingvo. La aŭtoro de la respondo estas M. Isaĵev, doktoro de filologiaj sciencoj, gvidanto de la problemgrupo pri la internacia helplingvo en la Lingvosciencia Instituto de la Soveta Akademio de la Sciencoj. Li prezentas la bazajn faktojn pri Esp-o kiel la plej konata kaj disvastigita internacia lingvo, atentigante pri ties praktikaj aplikoj en Sovetunio.



En Praha fine de 1975 okazis la VII-a konferenco de Internacia Sindikata Unuiĝo de Laboristoj en Konstru- kaj Lignoindustrio (UITBB), ano de la Tutmonda Sindikata Federacio (TSF). La kongreson partoprenis 250 delegitoj el 55 landoj.

La membro de la franca delegitaro Petro Levi, reprezentanta la sindikatan unuiĝon de cement-industrio de CGT (Ĝenerala Labor-Konfederacio), prezentis antaŭ la forumo dum la lasta kunsida tago la problemon pri la Internacia Lingvo. Li rilatigis sin al la favora ĉo, kiun vekis pasintjare la intervjo kun S. Gaspar, ĝenerala sekretario de la Hungara Sindikata Konsilantaro, pri la utileco de Esperanto en la internaciaj rilatoj de laboristoj kaj sindikatanoj.

La lingva problemo, diris i. a. P. Levi, postulas seriozan pripenson enkadre de TSF, plue en Internacia Konfederacio de Liberaj Sindikatoj kaj en Tutmonda Konfederacio de Laboro. Ĉiuj sindikatoj interesitaj povas integri Esperanton en siaj kulturaj aktivecoj, por

internaciskala etendo de la sindikataj rajtoj kaj por faciligi la reciprokajn rilatojn.

En sia referaĵo li pledis por integriĝo de laborulaj postuloj fronte al la kapitalisma krizo kaj danĝeraj manovroj de la multnaciaj societoj.

Al la interveno pri la internacia lingvo venis kelkaj reagoj: la hungara kaj greka delegitaroj varme subtenis ĝin — ili intencas progresigi la aferon sur konkreta tereno, opinante krei specialan komisionon sur la nivelo de UITBB aŭ tiu de TSF. Aliaj delegitoj evidencigis per sia sinteno ĝenerale, ke ili apenaŭ konscias pri la problemo. Diversaj estis ankaŭ la reagoj de la interpretistoj.

La estraro de UITBB, kiel konfirmis P. Levi, konsideris la proponon de la hungara delegitaro „ne la ĉefa, sed grava“. Espereble tiu ĉi pozitiva starpunkto de UITBB influos iniciatojn por la internacia lingvo en la aliaj sindikataj organizaĵoj.

O. Knichal

El „Starto“, 6/1975

Ni recenzas

„NEFORGFSEBLAJ TAGOJ“

Niaj vjetnamaj amikoj ree faris al ni belegan donacon. En Hanojo la fremdlingva eldonejo aperigis en Esperanto daŭrigon de la memorverko de generalo Vo Nguyen Giap „Neforgeseblaj tagoj“ (la dua parto). La libro estas dediĉita al la okjara rezistmilito de la heroo vjetnama popolo kontraŭ la francaj koloniistoj.

Dum okdek jaroj la vjetnamoj suferis sub la franca kolonia jugo. Kiam Francio kapitulacis antaŭ la Hitleraj faŝistoj, Vjetnamion invadis la japanaj faŝistoj. Ili anstataŭis la francojn.

Longajn jarojn la vjetnama popolo, gvidata de la Komunista Partio, rezistis kontraŭ la japanoj, venkis ilin, liberigis sian landon. En Hanojo la 2-an de septembro 1945 estis solene deklarita la Vjetnama Demokratia Respubliko.

Tiam de nordo alvenis la landon 200-mila armeo de Ĉan Kaj Ŝek por „kapitulacigi“ la japanojn. De sudo kun la sama celo venis angloj, kaj tuj alboridigis franca militŝipo por restarigi la antaŭmilitan kolonian ordon en Vjetnamio.

Kun granda respekto kaj vervo Vo Nguyen Giap pentras la neflekseblan figuron de la granda popola gvidanto, la unua prezidanto de Vjetnamio Ho Chi Minh (Ho Ŝi Min), kiu

diras: „Prefere morti en honoro, ol vivi en malgloro.“

Sekvis la glora venko ĉe Djen Bjen Fu. La francaj sklavigantoj kapitulacis. Tamen la landon penetris la sangavidaj usonaj imperiistoj. Sed ili ankaŭ estis disbatitaj kaj forĵetitaj el Vjetnamio.

Finante la libron la aŭtoro skribas: „... La usona imperiismo — la bandestro de ĉiuj imperiismoj. . . , kiu ne tiris lecionon el la historia evoluo, montriĝis ekstreme pli malicruza kaj pli kruelega.“

La libron „Neforgeseblaj tagoj“ devas tralegi kaj propagandi ĉiu esperantisto.

Jakov Vlasov, Ŝadrinsk, USSR

La 14-an de majo 1976 la esperantistoj de urbo Veliko Târnovo, Bulgario, solene celebros la 80-jaran jubileon de sia E-Societo „Lumo“ unu el la plej malnovaj E-societoj en Bulgario, fondita la 1-an de majo 1896.

Salutletrojn oni povas sen li al adreso: Esperanto-Societo „Lumo“, p. k. 121, 5000 Veliko Târnovo, Bulgario. Represo dezirata.

Por via lingva perfektigo

S-ano F. Faulhaber, aŭtore de la libro „Ne tiel, sed tiel ĉi“, eksciinte pri la aperigo de fragmentoj el ĝi sur la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“, direktis leteron al la redakta komitato. En ĝi li esprimas dankon pri tiu kaj similaj iniciatoj, kiuj helpas al la legantoj akiri bonan E-stilon. Interalie s-ano Faulhaber rekomendas, ke oni legu E-tekstojn laŭte por bone kontroli kaj pli facile rimarki eventualajn stilerarojn. Kiel informas s-ano Faulhaber, antaŭ nelonge aperis la tia eldono de lia tre valora libro.

Esperantistoj povas skribi al li, prefere sendi ilustritajn kartojn, je adreso: F. Faulhaber, p/a „De Wulvenhorst“, Prins Bernhardsstraat 2, Oudewater, 2609, Nederland.

A

Ne tiel. . .

1. Jaĉjo sentis la larmojn brulantajn post liaj palpebroj; li glutis por reteni ilin; li mordis sin sur sia lipo, li pugnigis siajn manojn en siaj pantalonpoŝoj, li kuntiris siajn piedfingrojn en siaj ŝtrumpoj.

2. En nia okazigita kunveno ni decidis okazigi la Zamenhofan vesperon la 20-an de decembro. Ĝi okazos en la granda salono de „Konkordo“.

3. Laŭte kriante li returnis sin kaj kuregis returne, el la aleo sur la pavimon.

4. Ĉe la lernejo la lernantoj jam svarmis. La lernantoj de la plej altaj klasoj estis malpli bruaj ol ordinare.

5. La tutan tagon la knabo fiŝkaptadis per la „kakevaj“, speco de malgranda najlotirilo. Li tiam lasis pendi en la akvo etan fiŝon el eburo kaj malrapide tiris ĝin antaŭen, tiel, ke ĝi kvazaŭ naĝis. Tiam jen kaj jen granda fiŝo venis por vidi, kia fiŝeto tiu do estas. Tiam la knabo ne movis sin, ĝis la fiŝo estis tute proksima; tiam li subite kaptis ĝin per sia kakevajo.

6. Refoje puŝon, piedfrapon. Tiam ambaŭ knaboj kaptis unu la alian kaj baldaŭ ambaŭ ruliĝis sur la vojo.

B

. . . sed tiel ĉi!

(liaj, siaj): Jaĉjo sentis la larmojn brulantajn post liaj palpebroj kaj glutis por reteni ilin. Li mordis la lipojn, pugnigis la manojn en la poŝoj de sia pantalone kaj kuntiris la piedfingrojn en siaj ŝtrumpoj.

(okaz): En nia kunveno ni decidis okazigi la Zamenhofan vesperon la 20-an de decembro en la granda salono de „Konkordo“.

(returne): Laŭte kriante li sin turnis kaj kuregis el la aleo sur la pavimon.

(lernantoj): Ĉe la lernejo la lernantoj jam svarmis. Tiuj de la plej altaj klasoj estis malpli bruaj ol ordinare.

(tiam): La tutan tagon la knabo fiŝis per la „kakevaj“, kiu similas malgrandan najlotirilon. Tio okazis jene: li pendigis en la akvon etan fiŝon el eburo kaj malrapide ĝin tiris tiel, ke ĝi kvazaŭ naĝis. Jen kaj jen granda fiŝo venis por rigardi, kia fiŝeto tio estas. La knabo ne movis sin, ĝis la fiŝo estis proksime, tiam li ĝin subite kaptis per sia kakevajo.

(ambaŭ): Refoje puŝon, piedfrapon. Tiam la knaboj kaptis unu la alian kaj baldaŭ ambaŭ ruliĝis sur la vojo.

Rimarkoj ĉe:

1. (liaj — siaj): En la lingvo de la originalo la posedaj pronomoj estas unusilabaj, pro kio ili ne akcentiĝas kaj preskaŭ kunfandiĝas kun la sekvanta vorto. En Esperanto ili ricevas iom da akcento, ĉar ili estas dusilabaj kaj ne kunfandiĝas kun la vorto sekvanta. Tial ni kelkfoje anstataŭigis tiujn vortojn per la, kiu vorto modeste sin tenas malantaŭe.

3. La duan *returne* ni povas forlasi, ĉar la ideo estas jam sufiĉe esprimita en la unua.

6. (ambaŭ): Aliaj solvoj: a) la dua „ambaŭ“ povas esti anstataŭigata per „ili“, kiu vorto sonas pli malpeze: „... kaj baldaŭ ili ruliĝis sur la vojo“; b) Ankaŭ „ili“ povas malaperi: „Tiam la knaboj kaptis unu la alian kaj baldaŭ ruliĝis sur la vojo“.

Elektis: N. Aleksieva

MATEMATIKA ENIGMO

$$\begin{matrix} P & LE & NA & VO & R & TA & RO \\ (a-b) + (c-d) + (e-f) + (g-h) + (i-j) + (k-l) + (m-n) = Z \end{matrix}$$

a) Parto de piedo; b) Teritorio de nacio; c) Skribaĵo; d) Grundo, humo; e) Tutaĵo de ĉio ekzistanta; f) Alta konstruaĵo; g) Nekonsonanto; h) Malmoliĝinta haŭto; i) Ĉarmo; j) Prapatro; k) Etendita aŭ sternita substanco aŭ materialo; l) Firma deziro; m) Literatura verko; n) Parto de la brako; z) Grava eldonaĵo de SAT.

Fl. Nikolov



Kiril Kuraškevič

BALADO PRI LA SENMORTECO

Kiam antaŭvespere en la vilaĝon eniris la faŝistaj soldatoj, ĝi estis senhoma. Ĉiuj loĝantoj estis irintaj en la arbaron.

La soldatoj instalas sin en la vilaĝanaj domoj. Sed apenaŭ la luno sin kaŝis post la nubojn kaj la malluma nokto vualis la vilaĝon, subite komencigis pafado.

La faŝistoj elkuris eksteren.

— Kie oni pafas?

— Jen tie, en la salikejo. Tie estas kaptita partizano.

Al la oficiro oni alkondukis knabon vestitan en blua bluzo kun blankaj butonoj. Li estis ne pli ol dekkvarjara, sed kuraĝe rigardis en la fieran vizaĝon de la oficiro.

— Kiu vi estas? — demandis la faŝisto.

— Mi estas partizano, — fiere respondis la knabo.

— Kie troviĝas via taĉmento?

— Mi ne scias.

La faŝistoj longe turmentis la knabon, sed li diris eĉ ne unu vorton. Ĉe la tagiĝo oni pafmortigis lin.

La sekvan nokton eksplodis la malamikaj municprovizejoj. Kaj matene antaŭ la mirigita leŭtenanto staris ligita knabo en blua bluzo kun blankaj butonoj.

— Kiu vi estas?

— Mi estas partizano.

La hitlerano ne fidis al siaj okuloj. Antaŭ li staris la sama knabo, kiun hieraŭ la soldatoj pafekzekutis.

— Ho, mein gott!¹ Kia lando! — La oficiro forviŝis la aperintan ŝviton survizaĝe kaj komencis krii: — Pendigu, tuj pendigu lin!

La ordono estis plenumita.

... La faŝistoj ne dormis ankaŭ dum la tria nokto. Tiun nokton oni eksplodigis la faŝistan komendantejon kaj la leŭtenanto trafis en partizanan bivakon.

Kiam oni malligis liajn okulojn, li vidis antaŭ si nejunan partizanon kaj apud li. . . Apud la partizano estis knabo en blua bluzo kun blankaj butonoj.

La faŝisto paligis. Li falis surgenue kaj komencis krii kiel freneza:

— Estu malbenita Hitler, kiu sendis min en tiun ĉi sorĉitan landon! Ĉi tie la homoj reviviĝas kiel dioj. . .

— Kion li parolaĉas? — demandis la partizano la interpretiston. Kiam la lasta tradukis, la partizano elparolis:

— Diru al li, ke mi estas patro de tiuj du knaboj, kiujn li murdis hieraŭ kaj antaŭhieraŭ. Antaŭ li estas la tria el miaj filoj.

El la rusa: Evgeni Georgiev

¹ Ho, dio mia!

LA UNUAJ . . .

● La unua bulgara orkestro estis organizita en 1851 en u. Ŝumen. Direktanto estis la hungara elmigrinto Mihaj Ŝafran. Post dek jaroj oni elektis kiel direktanton la bulgaron Dobri Vojnikov. En la repertuaro inter la aliaj, estis ankaŭ muzikverkoj de Dobri Vojnikov mem.

● La unua instruista kongreso (sâbor) okazis en la komenco de 1870 en Plovdiv. Ĝin partoprenis Petâr Bonev — partopre-

ninto en la Legio de Rakovski, unu el la gvidantoj de la Aprila Ribelo (1876), Dobri Ĉintulov, Joakim Gruev, Ĥristo Trufĉev — revoluciulo, pereinta en la aprila ribelo.

● La unua teatra spektaklo en Bulgario estis organizita antaŭ pli ol 100 jaroj en la domo de Dimitro Papazov en Trojan de la lokaj instruistoj. Baldaŭ post la liberigo el la osmana jugo en la urbo estis fondita la unua teatra trupo, kiu prezentis

kun sukceso teatraĵojn kiel «Malriĉulo Tanĉo», «Ivanko», «Borislav», «Ĥaŝove». En 1909 amatoroj preparis ankaŭ la unuan opereton.

● La unua teatra spektaklo en Sofio estis prezentita de amatora trupo «Monta Floro» la 23-an de novembro 1879.

● La unuaj bulgaraj poŝtmarkoj aperis la 1-an de majo 1879. Oni ellaboris ilin en la Rusa Stata Presejo en Petrogrado, ĉar tiam en Bulgario ankoraŭ ne estis nacia mon-unuo. La valoro de la poŝtmarkoj estis fiksita laŭ la franca sistemo — en centimoj kaj frankoj. Oni supozas, ke aŭtoro de la poŝtmarkoj estas Georgi Jakovleviĉ Kirĉov — direktoro de la Stata Presejo en Sofio. La valoro de la poŝtmarkoj estis 5, 10, 25, 50 centimoj kaj 1 franko.

● La unua oficiala nombrado de la loĝantaro en Sofio okazis en 1880. Tiam la ĉefurbo havis 20 856 loĝantojn kaj 5635 konstruaĵojn.

● La unua belarta verko, tradukita en bulgaran lingvon, estis «Robinzono Kruzo» eldonita de d-ro Ivan Bogorov en 1849 sub la nomo «la mirindaĵoj de Robensin Kruso».

● La unua komuno en Bulgario estis en urbo Samokov la 13-an de junio 1910. La laboruloj de la urbo atingis grandan venkon. El 14 komunumaj konsilantoj 8 apartenis al la Partio de Striktaj Socialistoj — (ekde 1919 — Komunista Partio). La unua urbestro de la nova komuno estis Georgi Zujbarov. La komuno ekzistis 18 monatojn.

Kompilis: Marin Bâcev



REMEMORO PRI GEORGI MARKOV

Jam 6 monatoj ekde la forpaso de nia sindona E-veterano Georgi Markov el Blagoevgrad!

Naskita en 1905 en Gorna Ĝumaja (nun Blagoevgrad), G. Markov frue ligas sian sorton kun la batalo por pli da socia justo kaj libero, fariĝas fidela soldato de la Bulgara Komunista Partio. Persekutata, multfoje arestata kaj turmentata de la faŝisma polico, li firme toleris ĉion. La interesojn de la Partio li ĉiam starigis super siaj personaj intereso, la volo de la Partio estis por li leĝo kaj ĉiun partian postulon li plenumis konscie kaj strikte.

G. Markov havis grandan amon al Sovetunio. Por li estis tute klare, ke sen USSR ni ne povus esti liberaj kaj sendependaj, ni ne povus konstrui novan vivon en nia Patrolando.

Li estis unu el la fondintoj de la E-movado en urbo Blagoevgrad kaj multjara prezidanto de la loka E-societo. Markov estis feliĉa ĝisvivi ĝian 50-jaran jubileon.

Same li havas gravajn meritojn por la firmigo de la urba konsumkooprativo, kies longsempa direktoro li estis. Sindona sociaganto kaj altmorala, pura homo, Georgi Markov restas modelo por la nova generacio.

NI RESTIS SEN SIMEON ĈIRPANLIEV

Fine de decembro kamarado Simeon Ĉirpanliev aranĝis pentraĵekspozicion lige kun sia 70-jara jubileo. Esperantista kaj neesperantista publiko ĉeestis la inaŭguron kaj poste preskaŭ tutan monaton venadis por ĝui la artisme harmoniigitajn kolorojn, admiri lian arton de pentristo-realisto.

Jam proksimiĝis la tago, kiam la ekspozicio devis esti fermita. Kaj subite nigra novaĵo:

Ĉirpanliev morta! Nekredeble! Ja la hieraŭan tagon ni parolis kun li en la ekspozicisalono: li aspektis sana, energia, kun rideto renkontanta la vizitantojn!

Ĉe la enterigo kolektiĝis multaj sofiaj esperantistoj. La komunan angoron esprimis ĉe la tombo Kunĉo Vălev — sekretario de CK de BEA kaj prezidanto de la Sofia E-Societo „Diĉo Petrov“, kies membro estis Ĉirpanliev.



Forpasis vere kara, altvalora membro ne nur de societo „Diĉo Petrov“, sed ankaŭ de nia socio.

Dum sia tuta vivo Ĉirpanliev estis popola instruisto kaj lerneja direktoro, sindona sociaganto, amatora artisto kaj pentristo, dum la lastaj jaroj prezidanto de popola legejo „Leninska Iskra“. Kaj aparte grava por ni: talenta originala E-verkisto, al kies plumo apartenas multaj poeziaj kaj prozaj verkoj.

Funebre klinis la kapojn la sofiaj esperantistoj antaŭ la freŝa tombo de Ĉirpanliev, promesante sindone porti plu la verdan flagon.

K. V

FORPASIS JOZEFOPETRIN

La 30-an de novembro 1975 forpasis en sia 70-jaraĝo Jozefo Petrin — prezidanto de la Rumana Kunordiga E-Komitato.

Licenciulo de la estinta Akademio pri Altaj Komercaj kaj Industriaj Studoj, li profesie estis konteksperto kaj ekonomiisto. En tiu fako li laboris dum longa periodo en la Ministerio de Instruado kaj Kulturo kaj lastatempe, ĝis sia pensiĝo (1968) kaj ankaŭ poste, en la Konsilantaro de Socialisma Kulturo kaj Edukado.

Jozefo Petrin esperantiĝis en 1928 j. kaj de tiam ĝis sia lasta spiro sincere laboris por nia nobla idealo. Eminentia esperantisto, post la Dua Mondmilito li estis la centra figuro de la rumana E-movado.

Petrin reprezentis kompetente la rumanan esperantistaron ĉe diversaj internaciaj renkontiĝoj kaj Universalaj Kongresoj. Li estis delegito de la Unua Balkana E-Konferenco (Asenovgrad — Bulgario, 1946), elektita membro de la tiamfondita Balkanlanda Kontakta Komitato kaj de la redakta komitato de „Internacia Kulturo“ (kultura kaj socia revuo de la danub-regionaj E-asocioj, eldonita en Sofio).

La aktivecoj de J. Petrin estis diversflankaj: kursoj, lernolibroj, vortaroj, didaktikaj kaj esperantologiaj studoj. Speciale notindaj estas liaj tradukoj el la verkaroj de la plej famaj rumanaj poetoj. Li mem verkis esperantlingve.

Petrin estis membro de la Rumana Komunista Partio ekde 1946.

Pro siaj meritoj, li ricevis la Labor-Medalon.

Nobla karaktero, progresema, modesta kaj simpatia, Jozefo Petrin dum sia tuta vivo estis modelo de vera esperantisto.

Anne Baia



E-kurso de la Jurista E-Sekcio en Sofio

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Georgi Sestrimski — str. Silistra 4, Pazarĝik (kun esperantistoj-filatelistoj el ĉl; interŝanĝas pm).

Latinka Jordanova — str. Peruŝtica 4, Loveĉ (27-jara fraŭlino — kun ĉl pri ĉt).

Slavka Todorova — blok 208, vĥod G, V etaĝo, Loveĉ (32-jara fraŭlino — kun ĉl pri ĉt; interŝanĝas bk, insignojn ka).

Lernantoj 15-17-jaraj dez. korespondi tutmonde kaj interŝanĝi pm, bk, gr. diskojn ka. Komuna adreso: Pirdop, SPTU Mleko-prerabotvane, Esperanto-Rondo.

Hungario

Lernantoj 10-jaraj dez. korespondi en Esperanto tutmonde. Adreso de ilia instruistino: Paranhi Lajosne, 1157 Budapest, Hevesi Gy. u. 27. I. 3.

Pollando

Krystyna Pilarz — 39—200 Denbica, ul. Wolica 20, woj. Tarnowskie (19-jara — kun bulgaroj pri muziko, sporto, lit-ro, Esperanto).

Eva Miara — ul. Al. Woj. Pol. 11, 59—700 Boleslawec (16-jara — pri muziko, filmoj ka).

Honorata Wojno — ul. Wojny Pogorzal 43, 18—210 Szepietowo, woj. Lomzynskie (18-jara-kun gebulgaroj).

Wincenty Andrysiak — str. Kruczkowskiego 5 m 14, 58—309 Walbrzych skr. poĉzt. 303 (kun ĉl pri literaturo, pm).

Sovetunio

Solovjov Konstantin — ul. Jakuba Kolasa 9. kv. 27, Minsk 13 (23-jara — pri moderna muziko, insignoj, sporto, foto ka).

Ivan Kolakov — 394 028 Voroneĵ 28, Irkutskaja 21, kv. 28 (instruisto de germana lingvo — kun ĉl).

Irina Stepanova — ul. Moĵajskogo 6—8, 660 041, Krasnojarsk — 41, Siberio (20-jara studentino — kun ĉl pri ĉt).

Redakta Komitato: Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Marin BÂCEV, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Stefka ĤRISTOVA, Nenko JONKOV, Krâstju KARUCIN, Haim LEVI.

Administra sekretario kaj korektanto: Minko CONKOVSKI

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29


INTERNACIAJ ESPERANTO-KURSOJ

**de la 1-a de junio ĝis la 31-a de oktobro —
Pisanica, distrikto de Smoljan**

La Internacia E-kursejo en Pisanica organizas 14-tagajn kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Novaj kursoj komenciĝas ĉiun 1-an kaj 16-an tagon de la monato dum la tuta periodo de junio ĝis oktobro.

En la kursoj spertaj lektoroj instruas la internacian lingvon antaŭtagmeze dum kvin horoj. Post la tagmanĝo — siesto ĝis la 16-a h. Sekvas varia programo el: ekskursoj, sunbruniĝo, ludoj, dancado, vesperoj de la partoprenantaj nacioj k. a. La kursanoj ĝuas ankaŭ tuttagan peraŭtobusan ekskurson.

Plena pensiono kostas 70 levojn. Bulgaroj pagas 56 levojn.



ORA ESPERANTO-FERIADO

**de la 14-a ĝis la 24-a de septembro
sub la aŭspicio de Monda Turismo**

En la programo;

Promenadoj kaj ekskursoj per montaj telferoj kaj aŭtobusoj al pintoj Snežanka kaj Murgavec, al la Rokoj de Orfeo, Smoljan, Široka Lâka, la kastelo de Mogilica kaj aliaj vidindaĵoj, vizito de etnografiaj muzeoj, distingado kaj kolektado de fungoj, konkursoj, kolektivaj ludoj, lernado de kanzonoj, projekciado de diapozitivoj, vesperoj de la partoprenantoj, bazaro, sunbanado, ripozado en amika internacia medio.

Plena pensiono — 60 levojn. Bulgaroj pagas 45 levojn.

Aliĝiloj por ambaŭ aranĝoj estas akceptataj plej malfrue 30 tagojn antaŭ la komenco de la aranĝo. Se estas vakaj lokoj, oni povas aliĝi ankaŭ post tiu limtempo, pagante kotizon pli altan per 10%.

PISANICA 1025 m super la mara nivelo, 6 km de urbo Smoljan.

PAMPOROVO — la plej granda montara restadejo en Bulgario, populara ankaŭ eksterlande. Ĝi situas je 1620—1660 m super la mara nivelo.

En ambaŭ lokoj abundas koniferaj arbaroj, vastaj herbejoj, belegaj panoramoj. Venu ĝui la ĉarman Rodopi-montaron!

